


LA PONTO

Tweemaandelijks tijdschrift van de Limburgse Esperantovereniging.



Jaargang 3, nummer 3 (15), september-oktober 2010

Verschijnt op de eerste dag van iedere onpare maand.

Erkenningsnummer: P808228

V.U.: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel

Tel. + fax 011-73.20.47 – E-mail: pieter-jan.doumen@telenet.be

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)

Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 3, n-ro 3 (15): septembro-oktobro 2010

Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47

Retadreso: pieter.doumen@telenet.be

Redaktore...

Karaj Gelegantoj,

Ni esperas, ke vi pasigis kun via familio aŭ sola agrablajn kaj malstreĉajn feriojn hejme, eksterlande aŭ enlande. La granda varmego, kiu regis dum la monato julio, certe permesis al ĉiuj centprocente profiti de la suno, kiu malfeliĉe intertempe senkompate bruligis multajn verdajn gazonojn...

La infanoj reiras al la lernejo post du monatoj da dolĉa neniofarado, kaj baldaŭ ankaŭ rekomenciĝas la kursoj de Esperanto en la diversaj kluboj. Ni deziras al ĉiuj niaj legantoj-esperantistoj ne nur fruktodonan, sed ankaŭ agrablan novan laborjaron en ilia klubo!

Vi sendube malkovris kelkajn erarojn en la antaŭa numero de 'La Ponto' kontraŭ la bona uzo de 'sia', refleksiva poseda pronomo, kiu ĉiam rilatas al la subjekto (de la 3-a persono) de la konjugaciata verbo, infinitivo aŭ participo. Pro tio ŝuldas la tempomanko de la redaktoro, kiu, ĉe tiu ĉi okazo ekskuzas sin ĉe vi kaj promesas pli bone atenti estontece. La eraroj troviĝas sur la ĉi-sube indikitaj lokoj:
p. 2, kol. 2, lin. 29: legu 'lia lingvo' ;
p. 3, kol. 2, lin. 8 : legu 'lian tutan familion' ;
p. 4, kol. 1, lin. 17: legu 'ilia lingvo' ;
p. 4, kol. 1, lin. 33 : legu 'ĝian 22-an lokon' ;
p. 10, kol. 2, lin. 21: legu 'lia aktivado'.

Mi dubas, ĉu estas esperantistoj, kiuj spontane aplikas tiun malfacilan regulon senerare. Logiko ne ĉiam plifaciligas nian lingvon!

Multan legadplezuron ankaŭ ĉi-foje!

Pieter Jan Doumen

La sorto de nova ideo

(Het lot van een nieuwe idee)

Ĉiuj ideoj, kiuj estas ludontaj gravan rolon en la historio de la homaro, havas ĉiam la saman sorton: kiam ili aperas, la samtempuloj renkontas ilin kun neklarigebla malamikeco. La pioniroj de tiuj ĉi ideoj devas multe batali kaj suferi: oni rigardas ilin kiel frenezulojn,

infanece malsaĝajn homojn, aŭ eĉ rekte kiel malutilajn personojn.

La homoj, kiuj okupas sin pri la plej sencela kaj neutila sensencaĵo, se ĝi nur estas en modo kaj konforma al la rutinaj ideoj de la amaso, ĝuas ne sole ĉiujn bonojn de la vivo, sed ankaŭ ricevas la honoran nomon 'utila publika aganto', dum la pioniroj de novaj ideoj renkontas nenion krom moko kaj atakoj.

Legu la historion de kristanismo kaj de la diversaj grandaj ideoj en la regiono de scienco; legu la historion de la malkovro de Ameriko, de la enkonduko de la fervojoj k.t.p.

La ideo de Kolumbo, ke «devas ekzisti okcidenta vojo al Hindio», saĝas al ni nun simpla kaj natura. Sed iam estis homoj, kiuj ne kredis, ke oni povas iri al ĉia lando de oriento, kiel de okcidento, kvankam ili sciis, ke la tero estas globo. Kiam oni legas iliajn argumentojn kontraŭ la plano de Kolumbo, ni demandas nin, kiamaniere inteligentaj homoj povis diri tiajn sensencaĵojn, pro kiuj nun ruĝiĝus ĉia infano.



La unua vaportrajno en Anglio (1825)

Kiam oni montris al la homoj la forton de la vapore kaj ĝian uzeblecon, ŝajnis, ke neniam prudenta homo povus ion kontraŭdiri. Kaj tamen, kiom da jaroj da batalado, suferoj kaj moko la eltrovinto devis elteni! Kaj eĉ tiam, kiam fine li sukcesis atingi la celon, kaj en Anglio jam dum tri tutaj jaroj cirkuladis la lokomotivoj, kleraj homoj sur la kontinento de Eŭropo ankoraŭ skribis profundpensajn traktaĵojn pri tio, ke la konstruado de lokomotivoj estas infaneca entrepreno, ke ĝi estas nebla, neutila ktp.

Kio do estas tio? Ĉu tio estas ia epidemia idioteco? Ĉu efektive ekzistis tiaj homoj? Jes, ili ekzistis, kaj ili ne estis idiotoj. Ilia tuta kulpa konsistis el tio, ke ili aŭ ne volis prijuĝi la naskiĝantajn novajn ideojn kaj limigis sin al saniga ridado; aŭ ke ili prononcis juĝon el la konvinko, ke la proponata afero estas neplenumbla, kaj fermis sian cerbon al la argumentoj de la defendantoj de la nova ideo.


Al tiuj ideoj, kiuj ŝajnas senenhava fantazio al la samtempuloj kaj tia natura afero al la

posteuloj, ke ili ne komprenas, kiamaniere la pasintaj generacioj de la homoj povis vivi jarmilojn sen ĝi – al tiaj ideoj apartenas ankaŭ la ideo de la enkonduko de komuna lingvo por la komunikado inter la diversaj popoloj.

(El 'Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia' de S-ro Unuel, pseŭdonimo de D-ro L.L. Zamenhof)

Antaŭparolo de la Unua Libro (1) (*Voorwoord van het Eerste Boek*) (1)

Tiun ĉi broŝuron la leganto verŝajne enmanigas kun malfido, kun la antaŭkonceptita penso, ke estas prezentata al li ia nerealigebla utopio; tial mi devas antaŭ ĉio peti la leganton demeti tiun antaŭkonceptitan penson kaj alpreni kritikeman sintenon kontraŭ la prezentata afero.



Antaŭa flanko de la Unua Libro (en la rusa, 1887)

Mi ne detale parolos pri la enorma graveco por la homaro de la enkonduko de unu internacia lingvo, agnoskita de ĉiuj, kiu estus la egalrajta propraĵo de la tuta mondo, ĉar ĝi ne apartenas speciale al unu el la ekzistantaj popoloj.

Kiom da tempo kaj laboro oni dediĉas al la lernado de fremdaj lingvoj? Sed transirante la limojn de la patrio, ni tamen kutime ne kapablas komprenigi nin al homoj kiel ni. Kiom da

tempo, da penado kaj da materiaj rimedoj oni dediĉas por transporti la produktojn de ia literaturo al aliaj literaturoj, sed finfine per tradukoj ĉiu el ni povas konatiĝi kun nur tre malgranda parto de la fremdaj literaturoj; sed danke al la ekzisto de internacia lingvo, ĉiuj tradukoj povus esti farataj nur en tiu lingvo, kvazaŭ en por ĉiu komprenebla pontlingvo, kaj la redaktado de tekstoj kun internacia karaktero povus eble esti farata rekte en tiu lingvo. Tiam disfalus ĉiuj ĉinaj muroj inter la literaturoj de la tuta homaro; la literaturaj produktoj de la aliaj popoloj estus same tiel alireblaj por ni kiel la produktoj de nia propra popolo; sammaniere legado ebligus por ĉiuj homoj, kaj kune kun ĝi edukado, idealoj, konvinkoj, celoj, – kaj la popoloj povus tiam fariĝi unu sola familio.

Ĉar ni devas dividi nian tempon inter diversaj lingvoj, ni ne kapablas dediĉi nin al unu, kiel necesas; kaj ĉar unuflanke ĉiu el ni nur malofte perfekte mastras sian gepatran lingvon, kaj aliflanke ne povas lerni lingvojn kiel necesas, ni ankaŭ, kiam ni parolas nian gepatran lingvon, ofte estas devigataj prunti vortojn kaj esprimojn de aliaj popoloj, aŭ esprimi nin neĝuste kaj eĉ pensi fuŝe sekve de la nesufiĉeco de la lingvo.

La afero estus tute alia, se ĉiu el ni scipovus nur du lingvojn, – tiam ni mastrus ilin pli bone, kaj tiuj lingvoj mem povus pli bone evolui kaj riĉiĝi, kaj stari pli alte, ol nun staras ĉiu el ili.

La lingvo estas ja la plej grava motoro de la kulturo: danke al ĝi ni povis levi nin tiel alte super la bestoj; kaj ju pli alte staras lingvo, des pli rapide progresas popolo.

La diverseco de la lingvoj estas la kaŭzo de la diverseco kaj de la mutua malamikeco inter la nacioj, ĉar ĝi plej forte frapas la orelon, kiam renkontiĝas homoj: la homoj ne komprenas sin kaj tial timas unuj la aliajn. Kiam ni renkontas homoj, ni ne demandas ilian politikan opinion, en kiu parto de la terглоbo ili naskiĝis, kie loĝis iliaj prapatroj antaŭ kelkaj jarmiloj; sed se tiuj homoj parolas, ĉiu sono de ilia lingvo memorigas nin, ke ili estas fremduroj por ni.

Kiu iam spertis, kio signifas vivi en urbo, en kiu loĝas homoj de diversaj inter si batalantaj naciecoj, tiu sendube komprenas, kian grandan servon faras al la homaro internacia lingvo, kiu, sen penetri en la privatan vivon de la popoloj, povas esti, almenaŭ en landoj kie vivas diversaj popoloj, la administracia kaj komuna lingvo.

Kian grandegan signifon finfine internacia lingvo povus havi por scienco kaj komerco – unuvorte ĉe ĉiu paŝo –, pri tio, miaopinie, ne necesas detale paroli. Tiu kiu pensis nur unufoje pri tiu problemo, konsentos, ke nenia ofero estus tro granda, se per ĝi ni povus akiri universalan lingvon. Tial ĉiu provo tiudirekten, eĉ la plej malgranda, meritas nian atenton.

Al la afero, kiun mi nun prezentas al la leganta publiko, mi dediĉis miajn plej bonajn jarojn; mi esperas, ke ankaŭ la leganto, pro la graveco de la afero, povos havi iom da pacienco por atente legi ĝisfine la prezentatan broŝuron. (D-ro L.L. Zamenhof)

Novajoj el Esperantolando

(*Nieuws uit Esperantoland*)

Usono – *Esperanto nun havebla por iPod* – Laŭ anonco de PrMac, informretejo pri la Mac-mondo, la programo Esperanto – English to Esperanto Dictionary de la usona societo Sofweb, fondita en 1999 en Arizono, estas nun havebla por la senklavara komputilo *iPod*. La anonco donas interesajn informojn pri Esperanto. Bazaj klarigoj pri la lingvo kaj ties utileco aperas ĉe <http://www.sofweb.com/esperanto.php>, kie troveblas ekzemploj pri Serĉado (Search), Vikipedio (Wikipedia), Foliumado (Browse), Gramatikaj konsiletoj (Grammar tips) kaj pri ĝia uzateco en la mondo. Tio estas des pli interesa, ke tion anoncas komerca anglalingva firmao, plie, usona!

Pro la fermeca sinteno de Apple oni ne kapablas uzi ĉapelitajn literojn, kaj ankaŭ en la proksima estonteco tio ne eblos. Se vi tamen emas esperantumi, vi forjetu vian iFonon kaj aĉetu Android-telefonon, ekzemple unu el tiuj de HTC (<http://www.htc.com/>), kiu havas malferman sistemon, malfermajn fontokodojn kaj klavaron por Esperanto: <http://bubiloop.com/android-tools-anysoftkeyboard>. Henri Masson

Rusio – *Magistra disertacio pri Esperanto* – En la Rusa Universitato Amikeco inter la Popoloj, unu el la ĉefaj universitatoj en Rusio, la juna studento Dima Ŝevĉenko defendis la 25-an de majo sian magistran disertacion pri Periodaĵoj en Esperanto kaj ricevis por ĝi la noton ‘perfekta’. Tiun disertacion li defendis antaŭ lia recenzanto, la fama esperantisto kaj akademiano D-ro Prof. Magomet I. Isajev, sociolingvisto, elstara specialisto pri la iranaj lingvoj, kompetenta interlingvisto, aŭtoro de



lernolibro de Esperanto kaj de dokumenta verko pri tiu lingvo. Dima cetere estas i.a. la funkciiganto de la retejo www.esperanto.com. Aliaj informoj kaj fotoj aperas en Esperanto sur la blogo de Dima ĉe Ipernity: <http://www.ipernity.com/blog/55113/252420>. (Ret-info)


Francio – *Novo dokumenta filmo pri Eo* – La franca kinematografisto Jean-Dominique Gautier [ja-dominik'-gotje'] preparas novan dokumentan filmon pri Esperanto, kiu principe aperos en marto 2011, kaj kies titolo ĝis nun ankoraŭ ne estas elektita.

Temas pri profesia filmo dublite spektebla en la ses laborlingvoj de UN – la angla, la araba, la ĉina, la franca, la hispana kaj la rusa – kaj en Esperanto. Aldono de subtekstoj en pliaj lingvoj estas ebla, se venos helppropoj. La DVD jam estas antaŭmendebila: € 18 por individuoj, € 40 por grupoj aŭ bibliotekoj, kiuj krome aĉetos la rajton senpage projekcii aŭ pruntedoni la filmon. Filmitaj scenoj: semajno en Bjalistoko, prelego de Hori Jasuo, registrado de Afrika, kompilo kun Jomo kaj Vinilkosmo, kongreso de Sat-Amikaro en Hiliono, la franca-germana kongreso en Kajzerslaŭterno, la internacia Esperanto Muzeo en Vieno, kaj Ĉaŭdefono (Svislando). Ĝin produktos kaj financos la SAT-Eldonfako (SAT-EFK).

(Henri Masson)

Brazilo – *Leĝoprojekto por Eo-instruado* – Post la amasa reago de esperantistoj subtenantaj la aprobon de la leĝoprojekto por instigi la instruadon de Esperanto en la brazilaj mezlernejoj, la federacia deputito sinjorino Andreia Zito, el la ŝtato Rio-de-Janejro, de la partio PSDB, denove prezentis hodiaŭ sian favoran raporton.

Antaŭ pluraj semajnoj ŝi ial prenis sian raporton (ankaŭ favoran) al la Komisiono pri Edukado kaj Kulturo de la Brazila Deputita Ĉambro. La du versioj diferencis en tio, ke en la mezo de ŝia raporto estis aldonitaj tri alineoj, kies esenco estas:



« Nepras reliefigi, ke Esperanto ne celas anstataŭigi naciajn lingvojn, sed roli kiel dua lingvo por pritraktado de mondaj problemoj kaj internaciaj interpersonaj rilatoj. Ĝi ne havas kulturimperismajn celojn kaj agas favore al la konservado de la kulturo kaj la suvereneco de la popoloj.

« Nepras reliefigi, ke Esperanto ne estas ligita al iu ajn religio. Ĝi estas nur lingvo kaj tial ĉiuj rajtas ĝin uzi laŭplaĉe por iu ajn celo.

« Pri la jam pruvitaj avantaĝoj de la uzo de Esperanto ni povas aserti, ke, pro tio ke ĝi ne estas ligita al specifa lando, ĝi ne donas privilegiojn, kaj oni povas ĝin lerni pli rapide danke al la simpleco de la prononco, al ĝia internacia vortaro, al ĝia prefiksa/sufiksa sistemo, ĝia vasta literaturo de tradukitaj kaj originalaj verkoj, kaj ĝi faciligas la kulturajn kaj intelektajn interŝanĝojn inter la popoloj ».

La leĝoprojekto estos voĉdonita en unu el la venontaj ĉiusemajnaj sesioj de la deputita komisiono.

Vikipedio - WikiTrans

Ĉu la ĉina estas facila lingvo ?

(Is Chinees een gemakkelijke taal ?)

Multaj antaŭzorgemaj homoj opinias, ke nuntempe oni devus lerni la ĉinan lingvon, ĉar ekonomie la estonteco ŝajne estas al la ĉinoj kaj la ĉina lingvo. Sed tio ne estas tiel facila...

Eric Vanhove el Tervuren (Belgio) rakontis en la valona Esperanto-revuo 'Espéranto en Marche' sian sperton kun la ĉina lingvo, artikolon kiun ni transprenas ĉi-tie. Li skribas:

Lerni la ĉinan ?

Lingvoj ĉiam allogis min: la flandra estas mia gepatra lingvo, sed oni instruis min ĉefe franclingve. Mi loĝis en Germanio dum dek jaroj. Mi flue parolas angle kaj bone elturniĝas

hispane. Mi eklernis ankaŭ la surinaman, japanan kaj ĉinan lingvojn...

Tre interesas min la ĉina kurac-arto, la lukto-sportoj kaj la 'Ki Kunggimnastiko', kiuj instigis min lerni la ĉinan lingvon.

Dum unu jaro mi vesperkursis unu horon ĉiutage. Poste mi iris al Ĉinio, kredante, ke surloke mi pli facile praktikos ĝin. Malgraŭ la tiea lernado, mi kapablis nur balbuti kelkajn vortojn (peti manĝaĝojn, paroli pri la vetero kaj iom pri mi mem), sed mi neniam sukcesis konversacii pli ol dek minutojn.

En 2002 mi ricevis stipendion por studi la ĉinan en la fako de fremdaj lingvoj de la universitato de Pekino. Dum ok monatoj mi vizitadis kursojn po kvar horojn tage kaj ankaŭ studis po du horojn hejme. Ses monatojn poste mi komencis iomete paroli.

Eĉ se oni konas vortojn, estas ankoraŭ alia afero esti kapabla korekte prononci ilin por esti komprenata. Fakte ekzistas kvar malsamaj mandarenaj tonoj. Ok monatojn poste mi bone konis ĉirkaŭ mil vortojn, sed... oni bezonas almenaŭ 5000 vortojn por legi gazeton aŭ bazan libron. Do iom frustra situacio...

Kiam mi revenis en Belgion, mi ne plu praktikis la lingvon kaj denove kapablis nur iom paroli. Ĉar mi pasiigis pri tiu nekredible riĉa lingvo kun propra historio kaj propraj skribsignoj, necesos denove studi ĝin por denove pli bona praktiko...

Komentoj: tiu nefacila, sed altgrade intensa sperto validas por multaj aliaj lingvoj. Vivu la lingvoj, kaj vivu Esperanto, kies lernado estiĝas sufiĉe rapide plezuron kaj riĉecon de interŝanĝoj !

La angla estas malfacila lingvo

(Engels is een moeilijke taal)

La ortografio de la angla estas terure malfacila, kaj parte pro tio ankaŭ la prononco. Pro tio ŝuldas ankaŭ la fakto, ke la angla pruntis pli ol duonon de siaj vortoj el la franca kaj la latina, kaj en la moderna tempo ankaŭ el aliaj lingvoj. Tiel la sono 'i' povas estis skribata en diversaj manieroj: kiel 'e' en 'me', kiel 'ea' in 'meat', kiel 'ee' en 'sleep', kiel 'ei' in 'ceiling', kiel 'oe' en 'phoetus'. Sed 'ea' povas ankaŭ esti prononcata kiel [ej] en 'great', kiel [ɛ] en 'bread', kiel [ə] en 'learn', kiel [æ] en 'swear' kaj kiel [a] en 'heart'. Inverse 'ou' povas esti prononcata en ses manieroj: komparu 'house', 'court', 'soul', 'enough', 'cough', 'through'. Ofte vortoj estas malsame prononcataj depende

de sia signifo, kiel ekz. 'bow' [bou] (arko) kaj [bau] (branĉego), 'desert' [dizə.t'] (forlasi) kaj [dɛ'zət] (dezerto), 'read' [ri.d] (legas) kaj [rɛd] (legis), 'wound' [waund] (volvis) kaj [wund] (vundo). Kaj ekzistas ortografiaj diferencoj inter la brita angla kaj la usona angla: colour, color – travelling, traveling – centre, center.

Oni ne devas miri, ke ne nur vi kaj mi, por kiu la angla estas fremda lingvo, sed ankaŭ la anglaj, precipe la infanoj, havas grandajn problemojn lerni la anglan ortografion, kiu malaltigas la legonivelon.

Logika reformo de la angla ortografio ne eblas, ĉar ĝi farus la skriban lingvon tute nerekoncible. Cetere la angloj tiom ŝatas siajn tradiciojn, ke tia reformo estas nepensebla.

Oni povus kompari tion kun ilia rezisto kontraŭ la metra sistemo kaj la eŭro.

Krome estas multaj praktikaj kontraŭ-argumentoj: la multaj diversaj vokalsonoj postulus la uzon de diakritaj signoj (akcentoj ktp.) super la vokaloj kaj eĉ la enkondukon de novaj literoj.

Tio ne malhelpas, ke plifaciligado kaj pli da unuformeco de la ortografio multe utilis al la lingvo-uzantoj. Sed en Anglio ne ekzistas instituto kiu okupiĝas pri la lingvo, kiel en aliaj landoj. Ekzistas tamen asocio, kiu pledas por reformo de la ortografio. (*Laŭ H.B.V.L.*)

Gigantaj planedoj turniĝas mise (*Reuzenplaneten draaien verkeerd*)

La malkovro de mise turniĝantaj gigantaj planedoj ekster nia sunsistemo metas en dubon la nunan teorion pri la estiĝo de la planedoj.

La planedaro fariĝas ĉiam pli ekzota. Antaŭ malpli ol 20 jaroj oni ankoraŭ plenkore ridis pri la sugesto, ke eble ekzistas planedoj ekster nia sunsistemo. Ekde la malkovro de la unua ekstera planedo en oktobro 1995 ekis vera ĉasado de planedoj. Post la freŝdata malkovro de naŭ novaj planedoj, la nombro de eksteraj planedoj sumas je 452! De gasgigantoj de la kalibro de Jupitero ĝis planedoj iomete pli grandaj, ol nia tero. Oni dubas ĉiam malpli pri la ebleco de vivo sur tersimilaj planedoj.

Nemalmultaj el tiuj gigantaj planedoj kondutas ege strange, kiel aperas el esploro de la Eŭropa Suda Observatorio ESO. El sonda provo de 27 gigantaj planedoj, inter kiuj naŭ novaj, aperis, ke ses el ili turniĝas ĉirkaŭ sia patrinstelo kontraŭ la normala direkto. Ĝis nun oni akceptis, ke planedoj turniĝas en la sama direkto kiel la rotacia akso de sia stelo. Plue



evidentiĝis, ke la orbito de kelkaj aliaj planedoj estas oblikva kaj senorda.

Tio signifus, ke tiuj gigantaj planedoj ne ekstis, kiel oni ĝis nun ĝenerale pensis, el giganta disko de polvo kaj gaso ĉirkaŭ juna stelo, sed ke dum periodo de centoj da milionoj da jaroj ili estus altiritaj de sia patrinstelo el malproksimegaj limregionoj. Antaŭ ol instali sin sur la strangan orbiton ĉirkaŭ sia suno, ili estus detruintaj malgrandajn tersimilajn planedojn aŭ katapultintaj ilin en la spacon.

(*Het Nieuwsblad*)


Operacioj en la Ŝtona Epoko (*Operaties in het Steentijdperk*)

La restaĵoj de juna viro, kiuj estis malkovritaj en malnova tombo en Buthiers-Boulancourt [bitje'-bulankur'] en Francio igis arĥeologojn revizii sian evoluteorion pri la homo en la Ŝtona Epoko. La kaŭzo estas, ke tiuj ĉi restaĵoj el la Neolitiko, datitaj je la aĝo de ĉirkaŭ 7000 jaroj, liveras pruvmaterialon por operacia interveno. Tio suponigas, ke niaj prauloj el la Ŝtona Epoko estis multe pli progresintaj en medicino, ol ni pensis ĝis nun.

La arĥeologoj Cécile Buquet-Marcon [sesil' bike'-markon'] kaj Annick Samzun [anik' samzen'] kaj juĝa medicinisto Philippe Charlier [filip' ŝarlie'] konstatis, ke la maldekstra antaŭbrako de la viro estis operacie amputita, kaj ke la vundo estis purigita en sterilaj cirkonstancoj. La restaĵoj de la viro montris, ke li supervivis la operacion, kvankam li restis suferanta pro osteoartrito.

Evidente la ŝtonepokanoj ne estis tiel primitivaj, ol ni kutimas pensi.

(*El 'Leviathan', n-ro 56*)



Feng Ŝui balancigas la energion (*Feng Shui verdeelt gelijkmatig de energie*)

Vi bone aranĝis vian dominternon, tiel ke ĉio harmonias kaj energio povas libere flui. Sed aperas en ĉambro sinokomputilo, elektraĵdratoj, muso, eksternaj laŭparoliloj kaj via bone organizita energio konfuziĝas.

Feng Ŝui estas multjarcenta ĉina sistemo por ekvilibrigi kaj gardi la energion en ia domo. Laŭ la principoj de Feng Ŝui la farbo kaj la loko de la objektoj en iu ĉambro determinas la sukceson de la loĝantoj sur la profesia tereno. Komplekseco egalas al konfuzo. Tial tenu kiel eble plej simpla la kolekton da objektoj, farboj kaj teknologio kaj elektu naturan aranĝon. Tiel vi evitas konfuzon de la pozitiva energio aŭ 'ĉi'.

Suprendirektitaj lumigiloj en la anguloj de ĉambro aŭ en niĉo ekmovas la malrapidan energion, kaj negativeco malaperas.

Hela lumo en la ĉirkaŭaĵo de la komputilo stimulas la moviĝon de energio ĉirkaŭ la laborloko kaj tenas la energion movanta.

Tio ankaŭ stimulas kreemon, pozitivan pensadon kaj la disvolviĝon de novaj ideoj.

Rondajn, metalajn objektojn kiel bovlojn kaj vazojn oni metas prefere okcidenten, nordokcidenten kaj norden. Tiam stagnita energio transformiĝas en pozitivan 'ĉi', kiu moviĝas egale tra la ĉambro. La bovloj kaj vazoj devas tamen esti malplenaj, kvazaŭ ili atendas eblaĵojn, kiuj povas pleniĝi ilin.

Tenu vian laborspacon kiel eble plej orda kaj evitu amasiĝon de fatraso.

Verdo kaj flavo estas kreskokoloroj, kiuj simbolas plantojn kaj sunbrilon. Ĉiam uzu ilin en la sudo kaj la sudoriento. Tiuj koloroj de la

leviĝanta suno plifortigas la naturan energion en ia spaco kaj ĉe la homoj, kiuj trovoĝas tie.

Ruĝo kaj flavo estas fajraj koloroj, kiujn oni aplikas precipe en la sudo. Tiam ili altiras pozitivan energion, entuziasmon kaj novajn ideojn. Metu plantojn en la orienton, la sudoriento, la nordon aŭ la sudon de ĉambro. Iia natura agado egale distribuas la energion.

Nia rakonto: Aljoŝa Gorŝok (1)

(*Ons verhaal: Aljosja Gorsjok*) (1)

Aljoŝa estis la plej juna frato. Oni nomis lin Gorŝok (kruĉo), ĉar, kiam iutage lia patrino sendis lin kun kruĉo da lakto al la edzino de la diakono, li stumblis kaj rompis la kruĉon. Lia patrino donis al li batadon, kaj la infanoj incitetis lin, kriante: "Gorŝok!" Tiel li ricevis sian kromnomon.

Aljoŝa estis malgranda kaj maldika. Li havis grandajn, elstarantajn orelojn (liaj oreloj staris antaŭen kiel flugiloj), kaj li havis grandan nazon. La infanoj incitetis lin: "Aljoŝa havas nazon kiel terpomo sur talpejo!" Estis lernejo en la vilaĝo, sed Aljoŝa lernis malfacile. Cetere li neniam havis tempon lerni ion. Lia plej aĝa frato loĝis ĉe komercisto en la urbo, kaj ekde sia plej frua infaneco Aljoŝa helpis sian patron. Li havis nur ses jarojn, kiam li jam paŝtis la ŝafon kaj la bovinon kun sia pli aĝa fratino, kaj li estis nur duone plenkreska, kiam li dumtage aŭ dumnokte gardis la ĉevalojn. Ekde sia deka jaro li jam kapablis plugi kaj direkti ĉevalojn. Li ne estis forta, sed jes lerta, kaj li ĉiam estis gaja. La infanoj ridis pri li, sed li silentis kaj ridis ankaŭ. Kiam lia patro insultis lin, li silentis, aŭskultante lin. Kaj apenaŭ lia patro ĉesis insulti lin, li ridetis kaj faris la laboron, kiu estis farena.

Aljoŝa havis dek naŭ jarojn, kiam lia frato devis servi en la armeo. En ties loko la patro metis Aljoŝan en la servon de la komercisto. Li ricevis la malnovajn botojn de sia frato, ĉapon de sia patro kaj malnovan surtuton, kaj tiel vestita li estis veturigita al la urbo. Aljoŝa estis tre feliĉa pro siaj vestoj, sed la komercisto ne estis kontenta pri lia eksteraĵo. "Mi pensis, ke vi sendos al mi veran viron por anstataŭigi Simon-on," diris la komercisto, ĵetante rigardon al Aljoŝa. "Kaj vi kondukas al mi muknazulon. Al kio li taŭgas?"

"Li povas fari ĉiun laboron: jungi ĉevalojn, direkti ilin ien kaj labori kiel besto. Li nur aspektas kiel kano, sed li estas fortmuskola."

"Nu... mi vidos."

"Kaj la plej grava el ĉio: li agrable interrilatas.

Super ĉio li multe ŝatas labori.”

”Kion mi faru kun li? Lasu lin ĉi tie.”

Kaj Aljoŝa restis ĉe la komercisto.

La familio de la komercisto ne estis granda: la dommastrino, la maljuna avino, la plej aĝa filo, kiu estis edziĝinta, apenaŭ ricevis lernejan edukadon kaj helpis sian patron en la negoco, kaj alia filo, kiu estis tre inteligenta, frekventis la gimnazion kaj studis en la universitato – , sed de tie li estis forpelita, kaj nun li loĝis hejme. Plue la komercisto havis ankoraŭ filinon, kiu vizitis la gimnazion.



La granda rusa romanisto Leo Tolstoj (1828-1910)

Komence Aljoŝa malmulte plaĉis al ili. Li estis vera kampulo, malbone vestita, havis malbonajn manierojn kaj alparolis ĉiujn per ‘ci’, sed oni baldaŭ kutimiĝis al li. Li faris sian laboron ankoraŭ pli bone, ol lia frato. Li efektive estis tre bonvola, oni sendis lin fari ian ajn laboron, kaj li faris ĝin volonte kaj rapide. Sen halti li kuris de unu laboro al alia. Kaj same kiel hejme, Aljoŝa estis ŝarĝita per ĉiaj laboroj. Ju pli li faris, des pli da laboro oni donis al li. La edzino de la mastro, la patrino de la mastro, la filino de la mastro, la filo de la mastro, la butikisto, la servistino, ĉiuj sendis lin jen tien ĉi jen tien kaj ordonis al li fari jen tion ĉi jen tion. Oni daŭre aŭdis nur: “Rapidu, knabo”, aŭ “Aljoŝa, aranĝu tion!” “Kio estas? Ĉu vi forgesis tion?” “Jen, ne forgesu tion, Aljoŝa!” Kaj Aljoŝa kuris rapide, aranĝis tion, kaj ne forgesis tion, kaj faris ĉion kaj ridetis ĉiam. La botojn de lia frato li baldaŭ eluzis. La mastro riproĉis al li, ke li cirkuladas en difektitaj botoj, el kiuj elstaris la piedfingroj, kaj ordonis lin aĉeti novajn botojn sur la vendo-

placo. Tiel li ricevis novajn botojn. Aljoŝa ĝojis pri tio, sed liaj piedoj restis la samaj. Je la vespero ili doloris pro la konstanta galopado, kaj li koleris kontraŭ siaj piedoj. Aljoŝa timis, ke lia patro, kiam li estis venonta por ricevi la monon kiun li gajnis, sentos sin ofendita pro tio, ke la komercisto estis subtrahonta la koston de la botoj de lia salajro.

Vintre Aljoŝa ellitiĝis ĉe la tagiĝo, hakis hejt-lignon, purigis la korton, nutris la bovinon kaj la ĉevalon kaj donis al ili trinkaĵon. Poste li hejtis la stovojn, poluris la botojn, purigis la vestaĵojn de siaj gemastroj, pretigis la samovarajn, purigis ilin, kaj tiam la butikisto vokis lin, por ke li metu eksteren la butikvarojn, aŭ la servistino igis lin miksi la paston por la pano aŭ purigi la kasarolojn. Post tio oni sendis lin porti leteron al iu en la urbo, aŭ renkonti la filinon de la mastrino ĉe la gimnazio, aŭ aĉeti oleon por la maljuna virino. “Kie do vi restas tiel longe, malbenata knabaĉo!” diris jen unu jen alia al li. “Kial do vi irus mem? Aljoŝa kuras tiel rapide.” “Aljoŝa! Hej, Aljoŝa!” Kaj Aljoŝa kuris rapide.

Sian matenmanĝon li manĝis survoje, kaj li sidis malofte kun la aliaj ĉe la tablo por tagmanĝi. La servistino riproĉis al li, ke li ne manĝas kun la aliaj, sed ŝi kompatis lin kaj ĉiam gardis ion varman por li, kaj de la tagmanĝo kaj de la vespermanĝo. Precipe antaŭ kaj dum la festotagoj estis multa laboro fareda.

Sed Aljoŝa multe ĝojis en la festotagoj, ĉar oni donis tiam al li trinkmonon, kvankam oni donis malmulte. Li tiel jam ŝparis ĉirkaŭ sesdek kopekojn. Tio estis almenaŭ sia propra mono, kiun li povis elspezi kiel li volis. Lian salajron li neniam vidis. Lia patro venis ricevi la monon de la komercisto kaj riproĉis al Aljoŝa, ke li eluzis siajn botojn tiel rapide. Kiam Aljoŝa estis ŝparinta du rublojn danke al la trinkmono, li aĉetis, laŭ konsilo de la servistino, ruĝan trikitan domjakon, kaj kiam li surmetis ĝin, li daŭre ridetis pro ĝojo. Li parolis malmulte, kaj kiam li diris ion, li ĉiam faris tion balbute kaj mal-longe. Kiam oni ordonis lin fari ion, aŭ demandis lin, ĉu li povos fari tion ĉi aŭ tion, li ĉiam diris sen la plej malgranda hezito: “Tio povas esti farita”, kaj tuj li ĵetis sin sur la taskon. Preĝojn li konis neniam. Tiujn, kiujn lia patrino instruis al li, li tute forgesis, sed tamen li reĝis ĉiumatene kaj ĉiuvespere – li preĝis per la manoj, plurfoje solene krucoŝignante sin.

Verkita de Leo Tolstoj (Daŭrigota)

Kiam iam situis Trojo... (2)

(Waar eens Troje lag...) (2)

Kelkaj reĝoj en la antikva tempo vizitis Hisarlikon por honori la famajn heroojn de la troja milito. Inter ili estis la persa reĝo Kserkso, kiu oferis tie 1000 oksojn antaŭ ol invadi Grekion en la V-a jarcento a.K. Ankaŭ Aleksandro la Granda, reĝo de Makedonio, haltis tie antaŭ ol konkeri grandan parton de Azio. Sed la loko, kiun la greka historiisto kaj geografo Strabono nomis 'la tombon de Aĥilo', aperis poste esti tombomonteto el la Ŝtona Epoko.

Ĝis nun nenia pruvo estis liverita, ke la Trojo de Homero iam staris sur la monteto Hisarliko. Ĉu Heinrich Schliemann trovis la Trojon de Homero?



Heinrich Schliemann (1822-1890)

La demando pri la situo de la fama urbo multe fascinis la germanan industriiston kaj arĥeologon Heinrich Schliemann. La aserto de Homero, ke Helesponto kaj la insuloj Lesbo kaj Tenedo troviĝas proksime al Trojo, konvinkis lin, ke oni devos serĉi Trojon sur la turka monteto Hisarliko. De 1870 ĝis 1890 li farigis elfosaĵojn sur la monteto, kaj li efektive trovis tie la ruinojn de diversaj urboj, unuj sur la aliaj, sed neniuj urbo konvenis. La kvara 'Trojo' ekzistis inter 1800 kaj 1260 a.K., sed ĝin ne detruis fajro, sed tertremo, kiu okazis jarcenton tro frue. La sepa Trojo estis efektive detruita de fajro ĉirkaŭ 1180 a.K., sed la supozata atakanto Miceno ne plu ekzistis. Ĝi estis detruita de la misteraj Marpopoloj, kiuj detruis ĉiujn landojn ĉirkaŭ Mediteraneo. Heinrich Schliemann mem opiniis, ke tiu urbo

estis povinta enhavi maksimume nur 5.000 enloĝantojn, dum Trojo havis almenaŭ 100.000. Cetere, se tiel granda milito estus okazinta antaŭ Hisarliko, oni devus trovi tie amason da restaĵoj de bronza armiloj kaj skeletoj de ĉevaloj, sed escepte de unu lancpinto oni trovis nenion. Ĉar aĥaĵoj kaj trojanoj bruligis siajn mortigitojn, homaj skeletoj mankas.

La arĥeologiaj trovaĵoj apud Hisarliko tiom malakordas kun la epopeo de Homero, ke Sir Moses Finley, profesoro en la Universitato de Kembriĝo, diris, ke, "ju pli oni scias, des malpli tio estas bona por la tezo, ke tie okazis granda milito"... Kaj li konkludis, ke "oni devas tute forigi la trojan militon de Homero el la historio de la greka Bronza Epoko". Plie, la ebenaĵo antaŭ la monteto Hisarliko estas multe tro malgranda por tiel granda milito. La distanco ĝis la maro estas nur 6 km nuntempe. En la tempo de la antikvaj sciencistoj Strabono kaj Plinio (1-a jarcento p.K.) la distanco estis nur 2 km, kaj en la tempo de Homero ĝi estis ankoraŭ pli malgranda, se ne neekzistanta. Kiel du grandaj armeoj estus povintaj tie manovri kaj batali?

Ĉe ĉiu batalo la aĥaĵoj estus devintaj transiri riveron, kiu fluus inter la tendaro de la aĥaĵoj kaj Trojo, sed laŭ Homero ne estis rivero inter la du armeoj.

La ebenaĵo estis ankaŭ tro malgranda por situigi tie la 11 urbojn, kiujn Aĥilo detruis. Plue la golfeto, kiu laŭ Homero situis norde de Trojo kaj ne okcidente, estus multe tro malvasta pro loki tie 1186 ŝipoj, eĉ en du vicoj. Li skribas cetere, ke de la golfeto oni povas, vidi kiel la suno leviĝas super la maro, kio ne estas eble apud Hisarliko.

Jam en la antikva tempo oni konstatis, ke en la regiono ne estas fontoj, pri kiuj Homero tamen parolas.

Krome Homero skribas, ke Troado havas moderan marklimaton, ke ofte pluvas en tiu lando, ke la maro estas griza, ofte kovrita de nebulo, ke ĝi apartigas Troadon de la kontinento kaj havas fortajn tajdojn. Tra la ebenaĵo inter Trojo kaj la maro fluas ok riveroj, kaj, vidate de Trojo, Skamandro fluas maldekstre de la batalkampoj. La tero estas fertila, grasa kaj dikgleba, la lando estas tre riĉa je ĉevaloj kaj brutaro, estas multe da tritikkampoj kaj herbejoj kun abunde kreskanta herbo kaj multaj floroj kaj multaj poploj. Malantaŭ la urbo staras montoj aŭ montetoj, kie fontas riveroj. Proksime de la urbo estas fontoj. Eblas ĉirkaŭiri la urbon sen transiri riveron.

Hisarliko kaj ĝia ĉirkaŭaĵo plenumas neniun el tiuj kondiĉoj.

La unua, kiu dubis pri la tradicia loko de Trojo estis la flandro Karlo-Jozefo De Grave (1731-1806). En la universitato de Loveno li studis juron kaj klasikajn kaj modernajn lingvojn. En 1764, sub imperiestrino Maria-Teresia de Aŭstrio, li fariĝis membro de la Konsilantaro de Flandrio, en kiu li ludis gravan rolon. Post lia morto aperis en Gento lia libro kun la kurioza titolo (tradukita en Esperanton) ‘Respubliko de la Eliseaj Kampoj aŭ Antikva Mondo’. En tiu ĉi verko li provis demonstri, ke la Eliseaj Kampoj kaj la Infero de la Antikvuloj estas la nomo de antikva respubliko, situanta en la ekstrema nordo de Gaŭlio, nome sur la insuloj de la Malsupra Rejno, ke tie troviĝis la unua sanktejo de inicado en certajn misterojn, kaj ke Ulikso, alia nomo de Odiseo, tie estis inicita de Kirke, kiu estis la ĉefino de tiu Elisea religio.

En sia libro ‘De Germania’ (pri Germanio) la romia historiisto Tacito skribas, ke “Multaj opinias, ke Ulikso post longa erarado trafis en la Oceano, vizitis Germanion, fondis Asciburgium, kiu situas ĉe la bordo de Rejno kaj ankoraŭ nun estas enloĝata”.

Kion do faris tie Odiseo, tiel for de sia lando? La nuna Nederlando trans Rejno apartenis al Germanio. Per Oceano la antikvuloj ne nur indikis Atlantikon, sed ankaŭ la Okcidentan Skeldon, kaj ili nomis Belgion Malsupra Germanio. Ascibergium estas la nuna Assebroek, kiu antaŭe nomiĝis Asseberg. La nomon de Kirke oni retrovas en Zierikzee (la Maro de Kirke). La urbo Vlissingen signifas “la idoj de Ulikso”; la latina literoj v kaj u estis prononcaj sammaniere kiel ‘ŭ’.

Odiseo elŝipiĝis apud Vlissingen por oferi virŝafojn. Tiu loko ankoraŭ ĉiam nun nomiĝas ‘Rammekens’ (virŝafetoj).

Laŭ mia klasika vortaro ‘Prisma-woordenboek der Klassieke Oudheid’ de Dr. P.J. Reimer, Utrecht 1959, la greka esprimo ‘Elysion Pedion’ (Elisea Ebenaĵo) estas ĉarma loko en la ekstrema fino de la tero, kie la elektitoj de la dioj ĝuas agrablan kaj senzorgan vivon post sia morto, dum la aliaj mortintoj malsupreniris en Hades, la inferon.

La romia poeto Vergilio difinas la ekstreman finon de la tero kiel “la lando de la Morinoj apud la duobla enfluejo de la rivero Rejno”.

‘La ekstrema nordo de la tero’ estas do la nunaj Belgio kaj Nederlando.

Kial la Eliseaj Kampoj ne troviĝis ie en Gre-

kio, sed ĉe la Norda Maro, kaj estas nuntempe la nomo de granda pariza bulvaroj, la “Champs-Elysées”?

Laŭ la plej malnova tradicio la enloĝantoj de greka urbo Delfoj devenis de la hiperboreoj, mita popolo kiu loĝis en la ekstrema nordo de la tero ĉe la Hiperborea Maro, kiu estas la Norda Maro, kaj ke la dio Apolono (Apollôn) ŝatis restadi tie.

En malnovgrekaj tekstoj oni ofte trovas la esprimon ‘Apollôn tôn Dorôn’ (Apolono de la doroj), kiun oni retrovas en la nomo de la Nederlando urbo Apeldoorn. En Delfoj oni festis ĉiun kvaran jaron la Pitonajn Ludojn, memore al tiu dio, ĉar li mortigis la serpenton Pitono (Pythôn)..



Apolono, la greka dio de la suno kaj poezio

Homero nomis Hellesponton (maro de Hella) “nemezurebla kaj senlima”, adjektivoj kiuj certe ne estas aplikeblaj al Dardaneloj. Sed kial tiu maro nomiĝas ‘maro de Hella’? Hella kaj Frikso estis la infanoj de reĝo Atamanto de Orhomeno. La patrino estis la nimfo Nefela. Post deko da jaroj la nimfo reiris al la ĉielo, kaj la reĝo reedziĝis. Kiam la vicpatrino naskis propran filon, ŝi deziris mortigi la du infanojn de Nefela por sekurigi la tronon al sia propra filo. Tial la nimfo sendis de la ĉielo al

La Limburga Esperanto-Asocio

Dum sia kunveno de la 8-an de julio la estraro fiksas la programon por la laborjaro 2010-2011.

Infovespero:

La informvespero pri Esperanto okazos jaŭdon, la 30-an de septembro.

Kursoj:

La kurso por progresintoj komenciĝos jam la 2-an de septembro.

Se estos kandidatoj por la kurso por komencantoj, tiu ĉi komenciĝos la 7-an de oktobro.

Jarprogramo por la membroj de LEA:

Jaŭdon, la 28.10.2010: An Olijslagers gvidos skrabloludon.

Jaŭdon, la 25.11.2010: Henri Schutters prelegos pri Pieter Bruegel la Maljuna.

Jaŭdon, la 16.12.2010: Festsupeo honore al la naskiĝtago de D-ro L.L. Zamenhof.

Jaŭdon, la 27.01.2011: Libera podio: ĉiu ĉeestanto parolos pri libera temo dum 10 min.

Jaŭdon, la 24.02.2011: Jan Doumen prelegos pri la limburgaj dialektoj.

Jaŭdon, la 31.03.2011: Jan Doumen gvidos kunkantado akompanata sur gitaro de Paul Hotterbeekx.

Jaŭdon, la 28.01.2011: Henri Schutters gvidos la ludon 'Divenu la vorton'.

Jaŭdon, la 26.05.2011: Naturpromenado kun gvidisto; ĉiuj enloĝantoj de Peer estos invititaj partopreni.

Jaŭdon, la 30.06.2011: Globulludo (petanko) en la ĝardeno de Jan Doumen.

Ĉiuj aktivaĵoj okazos en la kultura centro de Peer, Zuidervest 2/A (apud la urbodomo fronte al la ĉefenirejo de la preĝejo), escepte tiujn de decembro, majo kaj junio.

Escepte de la kurso por progresintoj ili okazos iun jaŭdovesperon je la 20h00. La kunvenoj por la membroj ĉiam okazos la lastan jaŭdon de ĉiu monato (escepte en decembro). La ceterajn jaŭdojn okazos la kurso por komencantoj. La lokalo estos indikita sur ekrano ĉe la enirejo de la kafetario.

ili virŝafon kun ora felo, sur kies dorso la infanoj sukcesis eskapi al certa morto., Dum ili transflugis la maron, Hella, malfeliĉe, falis de la besto kaj dronis en la ondoj. Pli ol 50 loknomoj komencantaj per 'Hel-'

situas ĉirkaŭ la Norda Maro, rememorigante ankoraŭ nun la malfeliĉon de la knabineto. La Norda Maro meritas do pli juste la nomon Hellesponto, ol Dardaneloj, kiuj eĉ ne estas maro, sed markolo.

Estas strange, ke Felipe la Bona, duko de Burgundio kaj grafo de Flandrio, kiu unuigis la Malsuprajn Landojn, fondis, en 1430, la Ordenon de la Ora Felo, la unua tia ordeno.



Hella kaj Frikso sur la virŝafo kun la Ora Felo

Homero skribas, ke la aĥajoj kunigis sian ŝiparon apud lando kie kunfluas tri riveroj, lokon kiun oni trovas nur apud la Nederlandaj insuloj, kie kuniĝas Rejno, Mozo kaj Skeldo. Strabono opiniis, ke la aĥajoj ne estis grekaj, sed keltoj, ĉar iliaj moroj ne estas grekaj, sed keltaj, kiel ekzemple la bruligo de iliaj mortintoj kaj homoferoj sur la ŝtiparoj de la herooj. Cetere ili estis blondaj.

Sendube doroj, jonoj kaj eoloj devenis de la Malsupraj Landoj ĉe la Norda Maro kaj gardis memoraĵojn pri tiu regiono. Ili certe apartenis al la aĥajoj de Homero, kiu loĝis en la landoj ĉe la marbordo de okcidenta Eŭropo.

Pieter Jan Doumen (Daŭrigota)

○ ○ ○

Versaĵo de Abu Ali Ibn Sina

*De l' nigra kot' profunda ĝis alta ĉielbrondo
mi solvis ĉiun nodon enigman de la mondo,
de ĉiu tromp' kaj ruzo mi trovis la ŝlosilon,
la Morto restis sola demando sen respondo.*



Enhavo de tiu ĉi numero de La Ponto:

Paĝo 2: Kolofono

Redaktore

La sorto de nova ideo (*S-ro Unuel*)

Paĝo 3: Antaŭparolo de Unua Libro (1) (*D-ro L.L. Zamenhof*)

Paĝo 4: Novaĵoj el Esperantolando:

Usono: Esperanto nun havebla por iPod (*Henri Masson*)

Rusio: Magistra disertacio pri Esperanto (*Ret-info*)

Francio: Nova dokumenta filmo pri Esperanto (*Henri Masson*)

Brazilo: Leĝopropono por Eo-instruado (*Vikipedio – Wikitrans*)

Paĝo 5: Ĉu la ĉina estas facila lingvo? (*Eric Vanhove*)

La angla estas malfacila lingvo.

Paĝo 6: Gigantaj planedoj turniĝas mise.

Operacioj en la Ŝtona Epoko (*Leviathan*)

Paĝo 7: Feng Ŝui balancigas energion.

Nia rakonto: Aljoŝa Gorŝok (1) (*Leo Tolstoj*)

Paĝo 9: Kie iam situis Trojo... (2) (*Pieter Jan Doumen*)

Paĝo 11: Jarprogramo de LEA

Kvarverso de Abu Ali Ibn Sina

Leru Esperanton!

Kiom da fojoj ni ne staras en fremda lando kun frostinta lingvo, ne kapablaj paroli la lingvon de la tieaj homoj?

La mondo bezonas supernacian lingvon.

Sola Esperanto ofertas vere demokratan solvon por tiu problemo, ĉar per ĝia ekonomia kaj politika neŭtraleco ĝi metas ĉiujn homojn sur egalan nivelon.

Ĝi estas ne nur la plej facila lingvo en la mondo kaj la sola, kiu estas tute regula – ĝia grammatiko ne havas esceptojn –, sed ĝi ankaŭ pledas por egalaj rajtoj por ĉiuj popoloj.

“Tiom da lingvoj oni parolas, tiom da fojoj oni estas homo”, diris imperiestro Karel V.

Tamen homo bezonas, ekster sia dialekto, nur du lingvojn: sian nacian lingvon kaj Esperanton.

Esperanto ne volas anstataŭigi la naciajn lingvojn, kiel pensas iuj homoj, sed servi kiel komunikilo inter homoj, kiuj ne havas la saman gepatran lingvon.

Leer Esperanto!

Hoe vaak staan wij niet in een vreemd land met de mond vol tanden, niet in staat de taal te spreken van de mensen aldaar? De wereld heeft een supra-nationale taal nodig.

Alleen Esperanto biedt een echt democratische oplossing voor dat probleem, want door zijn economische en politieke neutraliteit plaatst het alle mensen op gelijke voet. Het is niet alleen de eenvoudigste taal ter wereld en de enige die volledig regelmatig is – haar grammatika heeft geen uitzonderingen –, maar zij pleit ook voor gelijke rechten voor alle volkeren.

“Zoveel talen als men spreekt, zo vaak is men mens” zei keizer Karel V.

Nochtans heeft een mens behalve zijn dialect maar twee talen nodig: zijn nationale taal en Esperanto.

Esperanto wil niet de nationale talen vervangen, zoals sommigen denken, maar dienen als communicatiemiddel tussen mensen die niet dezelfde moedertaal hebben.

Apprends l'Espéranto!

Combien de fois ne restons-nous pas bouche bée dans un pays étranger, incapables de parler la langue des indigènes? Le monde a besoin d'une langue supranationale.

Seul l'Espéranto offre une solution vraiment démocratique à ce problème, car par sa neutralité économique et politique, il met tous les hommes sur un pied d'égalité. Ce n'est pas que la langue la plus simple au monde et la seule qui soit tout à fait régulière – sa grammaire n'a pas d'exceptions –, mais il plaide aussi pour des droits égaux pour tous les peuples.

“Autant de langues on parle, autant de fois on est homme,” a dit l'empereur Charles Quint. Pourtant un homme n'a besoin, hors de son dialecte, que de deux langues: sa langue nationale et l'Espéranto.

L'Espéranto ne veut pas remplacer les langues nationales, comme pensent certains, mais servir de moyen de communication entre les gens qui n'ont pas la même langue maternelle.